BEL informas

n-ro 4/2015

la 31an de januaro 2015

31 de janeiro de 2015

Niaj 50-a BKE kaj 35-a BEJK sukcese finiĝis!

Nossos 50º BKE e 35º BEJK terminaram com sucesso

Foto: partoprenintoj organiziĝas por lasta foto

Foto: participantes organizam-se para uma última foto.

Okazis sukcese en Rio-de-Ĵanejro, 23-27/01, niaj naciaj ĉi-jaraj kongresoj, kun ĉirkaŭ 250 partoprenintoj. Akompanu en niaj venontaj BI la gravajn informojn, novaĵojn, lanĉojn kaj rezolucion. Riĉa artikolo aperos ankaŭ en la revuo Brazila Esperantisto. BI gratulas kaj dankas al ĉiuj!

BEL/BEJO

Realizou-se com sucesso no Rio de Janeiro, 23-27 / 01, os nossos congressos nacionais deste ano, com cerca de 250 participantes. Acompanhe nos nossos próximos BI as informações importantes, novidades, lançamentos e a resolução. Um rico artigo aparecerá também na revista Brazila Esperantisto. O BI parabeniza e agradece a todos!

BEL/BEJO

Kaj en 2016: Amazonio!

E em 2016: Amazônia!

Foto: Márcio Santos (esq.), presidente da AERJ e do LKK do Rio, entrega a bandeira a Joacir Camboim, presidente do LKK de Manaus. Atrás, Fernando Maia e Evandro Avellar (esq. e dir.), presidentes da BEJO e da BEL.

La unuan fojon okazos naciaj E-eventoj en nia norda regiono. La Asembleoj en la 50-a BKE/35-a BEJK finaprobis la okazigon de la 51-a BKE kaj 36-a BEJK en la urbo Manaus, ŝtato Amazonas. Dum la kongresoj jam dekoj da homoj aliĝis. Baldaŭ aperos la elektronika aliĝilo. Restu atenta kaj jam prepariĝu por tiu historia okazo. Laboroj de BEL, BEJO kaj la nova LKK jam komenciĝis!

BEL/BEJO

Pela primeira vez serão realizados eventos nacionais de esperanto em nossa região norte. As assembleias do 50º BKE / 35º BEJK aprovaram a realização do 51º BKE e 36º BEJK na cidade de Manaus, estado do Amazonas. Durante o congresso já dezenas de pessoas inscreveram-se. Em breve aparecerá o formulário eletrônico. Fique atento e já esteja preparado para esta ocasião histórica. Os trabalhos da BEL, BEJO e do novo comitê organizador local já começaram!

BEL/BEJO

BEL al UEA: respondecigi registarojn

BEL à UEA: responsabilizar governos

Laŭ kompreno de BEL, la E-movado povas unuiĝi ĉirkaŭ la laboro kunrespondecigi la registarojn pri la Internacia Lingvo. Konu la proponon senditan de BEL al UEA en junio/2014, legante la raporton

O movimento esperantista pode unir-se em torno do trabalho de corresponsabilizar os governos pela Língua Internacional. Conheça a proposta enviada pela BEL à UEA em junho de 2014, lendo a matéria

"Kunrespondecigi registarojn pri Esperanto - ĉu ni volas? ĉu ni povas? Kiel?", publikigita ĉe http://www.esperanto-bilinguismo-suficiente.com. Kion vi pensas pri tio? Analizu, diskutu, engaĝiĝu. Tiu ĉi nia laboro restos aktiva en 2015.

Afonso Camboim Direktoro pri Instituciaj Rilatoj de BEL

"Kunrespondecigi registarojn pri Esperanto - ĉu ni volas? ĉu ni povas? kiel?", publicada em http://www.esperanto-bilinguismo-suficiente.com. O que você pensa sobre isso? Analise, discuta, engaje-se. Este nossso trabalho continuará firme em 2015.

Afonso Camboim Direktoro pri Instituciaj Rilatoj de BEL

Ege atendita lanĉo: Fundamento de Esperanto (Brazila Eldono)

Lançamento super esperado: Fundamento do Esperanto (Edição Brasileira)

Finfine aperis la ege atendita brazila eldono de la Fundamento de Esperanto. Ĝi portas la plej gravan verkon en Esperanto (originale verkita kvinlingve) ankau al la portugala en altkvalita traduko de Túlio Flores kaj en bela eldonado de la Brazila Esperanto Ligo, kiu restarigas sian eldonan agadon. Tiu verko estas havenda por tiuj, kiuj volas elstare regi Esperanton. Akiru nun:

http://belabutiko.esperanto.org.br/index.php/fundamento-de-esperanto-1224.html

BEL Informas/BEL@Butiko

Finalmente chegou a super esperada edição brasileira do Fundamento do Esperanto. Ela traz a obra mais importante em Esperanto (originalmente escrito em cinco línguas) também para o português em tradução de alta qualidade de Tulio Flores e bela edição da Liga Brasileira de Esperanto, que retoma suas atividades editoriais. Esta obra é essencial para aqueles que querem um domínio excelente do Esperanto. Adquira agora:

http://belabutiko.esperanto.org.br/index.php/fundamento-de-esperanto-1224.html

BEL Informas/BEL@Butiko

Kaj surprize lanĉita novega vortareto!

E lançamento surpresa de novíssimo vocabulário!

Dum la ĵus okazinta 50-a BKE samideanoj Fernando Pita kaj Maira Nobre lanĉis "Vocabulário Pentalíngue - Kvinlingva Vortareto", kiu enhavas la plej komunajn vortojn ĉiutage uzataj en esperanta, angla, franca, hispana kaj portugala lingvoj. Organizitaj laŭteme kaj belege ilustrita, la uzanto rapide akiras la necesan vortostokon por diversaj situacioj: domo, laboro, lernejo, urba vivo, vestaĵoj ktp. Zorge preparita dum jaroj, tiu vortareto estas bonega ilo ne nur por lerni Esperanton, sed por pere de ĝi aliri al novaj idiomoj!

Durante o recém-terminado 50º Congresso Brasileiro de Esperanto, os samideanos Fernando Pita e Maira Nobre lançaram o "Vocabulário Pentalíngue - Kvinlingvan Vortareton", que contém as palavras mais usadas no cotidiano, em Esperanto, inglês, francês, espanhol e português. Organizado por tema e belamente ilustrado, o usuário rapidamente adquire o vocabulário necessário para diversas situações: casa, trabalho, escola, vida urbana, roupas etc. Cuidadosamente preparado durante anos, este vocabulário é uma excelente ferramenta não apenas para se aprender Esperanto, mas para, através dele, chegar a novos idiomas!

Baldaŭ ĝi aperos en BEL@Butiko. Dume pliaj informoj, kontaktu la aŭtoroj pere de

Em breve, na sua BEL@Butiko. Enquanto isso, para mais informações, contate os

nandopit@uol.com.br.

Fernando Pita/BEL@Butiko

autores pelo email nandopit@uol.com.br.

Fernando Pita/BEL@Butiko

Francio: Kastelo Greziljono anoncas sian programon kaj serĉas kunlaborantojn por aŭgusto

França: Castelo Grésillon anuncia programa de 2015 e procura colaboradores para agosto

Kontrolu en:

http://esperantomovado.blogspot.com.br/2015/01/kastelo-greziljono-anoncas-sian.html

Adonis Saliba/BEL Informas

Confira em:

http://esperantomovado.blogspot.com.br/2015/01/kastelo-greziljono-anoncas-sian.html

Adonis Saliba/BEL Informas

29-a de januaro: Adam Zamenhof

29 de janeiro: Adam Zamenhof

La 29-an de januaro oni kunmemoras la 75-an datrevenon de la murdo de Adam Zamenhof, la sola filiĉjo de Ludoviko. Du tagojn post la Internacia Tago, kiu kunmemoras la viktimojn de Holokaŭsto. Pri la esperantistaj viktimoj blogis Javier Guerrero tie ĉi: http://enesperantujo.blogspot.com.es/2015/01/nomon-eternan-al-ili_27.html.

Ĉe Hispana E-Federacio oni publikigis artikolon pri tiu malgaja memorigo. Ankaŭ estis kreita artikolo pri li en la hispanlingva Vikipedio.

Informis: Tonjo del Barrio http://www.delbarrio.eu

Em 29 de janeiro, rememoramos o 75º aniversário do assassinato de Adam Zamenhof, o único filhinho de Ludoviko. Dois dias depois do Dia Internacional que rememora as vítimas do Holocausto. Sobre as vítimas esperantistas Javier Guerrero postou em seu blogue: http://enesperantujo.blogspot.com.es/2015/01/nomon-eternan-al-ili_27.html.

No portal da Federação Espanhola de Esperanto, publicamos um artigo sobre esta triste lembrança. Foi criado também um artigo sobre Adam na Wikipedia em espanhol.

Informou: Tonjo del Barrio http://www.delbarrio.eu

Aliĝu al niaj komunumoj ĉe Facebook kaj Google +

BEL invitas: vizitu kaj ŝatu nian paĝon ĉe facebook!

Conecte-se a nossas comunidades no Facebook e Google +

BEL convida: visite e curta nossa página no face!

www.facebook.com/brazilaesperantoligo

Ĉu vi jam realiĝis al BEL ?
Você já se refiliou à BEL ?

Malkovru en via BEL@Butiko

Descubra em sua BEL@Butiko

AL BEL-MEMBROJ: POR RICEVI 10%-AN RABATON, PETU VIAN RABAT-KODON ĈE LA ADRESO:

AOS MEMBROS DA BEL: PARA TER DESCONTO DE 10% NA COMPRA DE LIVROS, SOLICITE SEU CÓDIGO JUNTO AO ENDEREÇO:

belabutiko@esperanto.org.br

belabutiko@esperanto.org.br

Vizitu vian virtualan butikon:

Visite a sua loja virtual:

www.belabutiko.esperanto.org.br

Francisco Mattos
belabutiko@esperanto.org.br

Ni laboru kune!

Boletim bilíngue da Liga Brasileira de Esperanto Dulingva bulteno de Brazila Esperanto-Ligo

SDS Ed. Venâncio III Sala 303, Brasília - DF, CEP 70.393-902
Telefones: (61) 3226-1298 Fax: (61) 3226-4446

Kunlaborantoj: Affonso Soares, Ana Ribeiro, Anna Lobo, Antonio Felix, Bert Schumann, Carlos Pereira, Diego Ribeiro, Emmanoel Lima, Emilio Cid, Eurípedes Barbosa, Evandro Avellar, Evandro Caboclo, Fabiano Henrique, Fabio Monteiro, Fabio Santos, Fernando Maia, Flávio Gomes, Francisco Mattos, Joe Bazilio, Juliana Evandro, Lucas Barbosa, Luís Guilherme Jardim, Márcio Santos, Marcus Aurelius Farias, Paulo Nascentes, Paulo Sérgio Viana, Rafael Zerbetto, Walter Fontes, Wesley Jefferson.

Sendu viajn novaĵojn al BEL informas

Ĉu vi deziras kontribui por la dulingva informilo de BEL kaj BEJO sendante novaĵojn? Se jes, bonvole plenigu la formularon per la necesaj datumoj:

Envie as suas notícias para o BEL informas

Você deseja contribuir com o boletim bilíngue da BEL e da BEJO, enviando novidades? Se sim, por favor preencha o formulário com as informações necessárias:

Sendu viajn novaĵojn

Ricevu BEL Informas per via retadreso